No. 3. BULTENO 1933. 15. VII.

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

Redakcio kaj administracio: Praha XIX., Uralské nám. 447. Telefona n-ro 718-41.

Redaktas: Dr. ST. KAMARYT, Dr. A. PITLÍK

Senpage por membroj de Ĉs. Asocio Esperantista. Aperas sesfoje dum la jaro.

## PROPAGANDU — SERIOZE!

Rapidegeco de la nuna vivado, atakanta senĉese la nervsistemon de la kultura homo, kaŭzas, ke multaj, forlasinte la publikan kaj societan „vivon", iĝas indiferentaj je ĉio, kio penas alligi la individuon al la kolektivo enlanda kaj eksterlanda. Aliflanke la aliaj, kies nervojn ne ekminacis sed kontraŭe imunigis la „moderna vivado", atentas sole pri tio, kio senpere tuŝas iliajn proprajn materialajn interesojn, ignorante ĉion, kio ne alportas tujan profiton ekskluzive al iliaj profesia kasto kaj politika klaso.

Por varbi ambaŭ nomitajn partojn de la homa societo por aferoj kaj ideoj, helpontaj la tutan nacion aŭ homaron, la aŭtoroj kaj pioniroj respektive ŝtatgvidantoj serĉas allogajn kaj taŭgajn rimedojn, kiuj venkus tiurilatan malatentemon. Oni ne ŝparas tiucele tempon, fortojn kaj monon konsciante, ke eĉ **afero plej bona kaj ideo plej savodona — ne propagandate — rapide malaperas** sen alporti la en ĝi latentan bonon kaj utilon.

Eĉ **esperanto** — kiel lingvo kaj ideo, — **bezonegas propagandon kaj reklamon**, kvankam ŝajnus memkomprenebla, ke ĝi, celante forigi la ĉefan malhelpon al la interkonsento de la diverslingvaj nacioj de la mondo, estos de ĉiuj — ili apartenu al kiu ajn nacio, raso, religio kaj klaso — amike alprenata kaj rapide aplikata. Sed la realaĵo aspektas iom alie! Kvankam jam granda parto de la kulturaj homoj scias, ke esperanto ekzistas, kaj multaj eĉ ĝin lernis kaj parolas, tamen ĝi havas ankoraŭ multege da potencaj malamikoj inter la filologoj, pedagogoj kaj profesiuloj, salajrataj pro scio al fremdaj lingvoj, plue inter homoj, kiuj penige „balbutas" unu fremdan lingvon, kaj precipe inter tiuj, kiuj volas nenion aŭ almenaŭ nenion novan lerni. Ĉar ĉiuj nomitoj havas certan influon je la direktodonaj publika opinio kaj ŝtataj oficoj, estas necese unualoke ilin ataki per poresperanta propagando.

Ĉar temas pri afero serioza, ankaŭ **la poresperantaj bataliloj kaj propagandiloj devas esti seriozaj** ne sole laŭforme sed ankaŭ laŭenhave. Ĉiu propagandu unualoke sur sia loko, en sia ĉirkaŭaĵo kaj en sfero, kie li per la kvalito de siaj klereco, societa signifo kaj profesia okupo povus atendi sukceson! Nenia kontraŭdiro de malamikoj al nia „sankta afero" devas resti sen respondo aŭ refuto, plenaj je veraj kaj konvinkeblaj argumentoj! Ne insultu la neinformitajn „malamikojn", sed per ĝentila kaj trankvila konduto, perfekta kaj ĉiuflanka scio al la propagandata afero, per faktoj kaj trafaj kontraŭargumentoj penu ilin imponi! Kaj fine, neniam forgesu, ke ĉe la poresperanta propagando ankaŭ validas la proverbo, ke „de majesta ĝis ridinda estas nur unu paŝo"!

Unu erara (nebone antaŭpripensita) paŝeto kaj via „propagando" renversiĝas en malpropagandon! Ne ŝajnas ekzemple esti serioza propagando, se oni — ne benite de la Majstro aŭ de liaj disĉiploj — nomas sin apostolo; se oni sur la vizitkarto uzas titolon „profesoro" de esperanto, farinte neniam ekzamenon; se oni gvidas kursojn, ne regante bone la lingvon kaj ne havante pedagogian talenton; se oni la facilecon de esperanto pruvas per asertado, ke ĝi dum unu semajno estas perfekte ellernebla; se oni peresperante vojaĝas (eble eĉ en kurioza aŭ vagabonda vestaĵo, nudpiede), almozpetante kaj ĉe la legacioj de sia ŝtato monon prunteprenante; se oni provizas per esperanta steleto ĉiujn (!) butonojn de sia vestaĵo, kio ekzemple kaŭzis, ke oni en koncerna urbo nun ĉiun frenezulon nomas „esperantisto"; se oni senĉese kriegas „Vivu esperanto!", rigardigante esperantajn flagetojn el ĉiuj siaj poŝoj; se oni sur la ĉapelo portas tutan muzeon de esperantaj insignoj; se esperantisto-abstinenculo ebriiĝas per likvoroj „verdkoloraj"; se oni — propagandante — kalumnias esperantajn pionirojn, societojn kaj instituciojn k.t.p.

Ĉar la neinformita publiko ofte juĝas pri la enhavo de la ideo laŭ la ekstera formo de ĝia propagando kaj karaktero de la propagandistoj, estas nepre konsilinde — esperanton propagandi serioze. *Per serioza, celkonscia propagando oni ne sole sukcesas veki estimon de la kontraŭuloj kaj malakrigi iliajn batalilojn, sed ankaŭ varbi por propagandata afero ĉiujn homojn de bona volo.*

Dr. A. Pitlík.

## Dr. Augustin Pitlík 50-jara.

Mi ne mensogos. Ne, mi ne miras, ke d-ro Pitlík estas jam 50-jara. Li ja naskiĝis 24-an de julio 1883 en Bavorov en suda Bohemio. Do kia miro pri la fakto mem? Kaj la honorinda leganto vidas sur la bildo, ke d-ro Pitlík aspektas juna. Decas, ke tiel aspektu kvindekjaraj junuloj. Sed ĉu ne estas dece inda je miro, ke d-ro Pitlík estas nur 50-jara? Liaj laboroj estas ja tiom diversaj kaj multaj. Evidente li komencis fosadi sian sulkon juna. Sed li rigardas vin el la apuda portreto plena de vivo, li ne finis siajn taskojn kaj ne finuzis kapablojn, kiujn dotis al li la misteraj fortoj de la vivo. Tial li ne ankoraŭ



taŭgas esti objekto de analiza aŭ sinteza traktato. Ni do limigu niajn konstatojn je la plej gravaj faroj.

La unua kronologie estas lia paroladvojaĝo tra Eŭropo. Depost 12. XII. 1912 ĝis 25. V. 1913 li travojaĝis Eŭropon kun esperantlingva prelego kaj lumbildoj „Pri Praha, popolaj kostumoj kaj Sokolaro". Li parolis en Braunschweig, Artwerpen, Lille, Veghel, Uden, Hertogenbosch, Bradford, Glasgow, London, Rouen, Paris, Beaune, Chaux de Fonds, Neuchâtel, Lyon, Ville Neuve sur Lot, Bordeaux, Barcelona, Teruel, Valencia, Terassa, Sampierdarena, Genova, Voltri, Kolding, Odense, København, Stockholm, Gevle, Leningrad, Tallinn kaj Kiev. Sume en 32 urboj de 11 ŝtatoj. La prelegon aŭdis sume 9370 homoj. Ĝi estis faro pionira, la unua post Parrish. Ĝi signifis samtempe gravan propagandon por esperanto kaj por ĉeĥa nacio. La vojaĝo estis entreprenita kun morala kaj negranda materia subteno de la sokolaro kaj aliaj institucioj. Meritas specialan rekonon, ke d-ro Pitlík sciis jam tiam ricevi tian subtenon por esperantlingva entrepreno; tiam ja estis nia movado multe malpli ŝatata en opinio de oficialaj rondoj. La entrepreno postulis certe gravajn oferojn materiajn kaj moralajn de la vojaĝanto.

Dua grava faro estis aranĝo de la XIII-a Universala kongreso en Praha 1921. Dr. Pitlík estis ĝenerala sekretario de la Loka Kongresa Komitato kaj de la kongreso mem kaj estis en liaj manoj la tuta organizo de la kongreso kaj kuŝis sur liaj ŝultroj la plena respondeco. Oni scias, ke la kongreso sukcesis tre bone kiom laŭ ekstera tiom laŭ interna flanko. Ankaŭ la financa rezulto de la kongreso estis eksterordinare bona, la gajnita mono multon helpis al esperantistaj institucioj. Estas ne disputebla merito de d-ro Pitlík, ke li zorgis pri ekonomia buĝeto same kiom pri publikaj kaj privataj monsubtenoj, kaj ke fine rezultis profito de pli ol cent mil kronoj.

Kaj kiel trian, sed la plej gravan faron mi nomu, ke li sukcesis esti nomita en la j. 1922 lektoro de esperanto ĉe la Ĉeĥa teknika altlernejo en Praha. La starigo mem de la lektorato ne estis afero facila. Sed multe pli malfacila estis kaj estas konservi tiun ĉi postenon multe pli gravan por la movado ol por la lektoro mem. Estas bezona daŭra, persista kaj insista batalo preskaŭ ĉiutaga kontraŭ la inerteco de la homoj, kontraŭ senintereso de la junularo, kiu devas liveri la studantojn, kaj kontraŭ malbona volo de la maljunularo, kiu envias kaj malhelpas eksperimenton pri novaj aranĝoj. Ni gratulu al ni pro persistemo kaj entuziasmo de dro Pitlík, ke la lektorato daŭras, kaj ke li lektoras, kvankam li ne estas pro tio salajrata.


Tiu ĉi artikolo ne estas biografio de d-ro Pitlík. Eĉ ne taŭgas artikolo okaza por havi celon biografian. Tamen estu tie ĉi diritaj kelkaj detaloj pluaj. D-ro Pitlík estas esperantisto depost 1903 kaj depost tiu tempo li daŭre partoprenas la movadon aktive en diversaj funkcioj. Post la milito li partoprenis preskaŭ ĉiujn universalajn kongresojn, en kelkaj li estis oficiala reprezentanto de nia registaro. Ankaŭ tiu ĉi lia klopodo pri konservo de afabla sintenado de oficialaj institucioj meritas dankan mencion. Ĝi ampleksis ne sole tiun ĉi reprezentadon, sed aferojn diversajn. Ni citu tie ĉi almenaŭ, ke d-ro Pitlík estis inter la unuaj esperantistoj en la mondo, kiu sukcesis esperantlingve paroli en la radio. Jam en jaro 1923 el Praha.

Li estas prezidanto de la Ĉeĥoslovaka Esperanta Instituto de li fondita depost ĝia fondo (1923), membro de la Lingva Komitato, ekzamena komisario por esperanto ĉe la ŝtata Ekzamena komisiono por popolaj kaj burĝaj lernejoj en Praha. Depost fondo de nia Asocio estas d-ro Pitlík ĝia membro, dum pluraj jaroj ĝia komitatano kaj depost 1930 ĝia vicprezidanto.

Profesie estas d-ro Pitlík supera sekretario en komerca ministerio kaj krom tio li estas ŝatata fakulo en porfremdula propagando turisma. Pro siaj meri-

## Dr. Augustin Pitlík 50-jara.

Mi ne mensogos. Ne, mi ne miras, ke d-ro Pitlík estas jam 50-jara. Li ja naskiĝis 24-an de julio 1883 en Bavorov en suda Bohemio. Do kia miro pri la fakto mem? Kaj la honorinda leganto vidas sur la bildo, ke d-ro Pitlík aspektas juna. Decas, ke tiel aspektu kvindekjaraj junuloj. Sed ĉu ne estas dece inda je miro, ke d-ro Pitlík estas nur 50-jara? Liaj laboroj estas ja tiom diversaj kaj multaj. Evidente li komencis fosadi sian sulkon juna. Sed li rigardas vin el la apuda portreto plena de vivo, li ne finis siajn taskojn kaj ne finuzis kapablojn, kiujn dotis al li la misteraj fortoj de la vivo. Tial li ne ankoraŭ



taŭgas esti objekto de analiza aŭ sinteza traktato. Ni do limigu niajn konstatojn je la plej gravaj faroj.

La unua kronologie estas lia paroladvojaĝo tra Eŭropo. Depost 12. XII. 1912 ĝis 25. V. 1913 li travojaĝis Eŭropon kun esperantlingva prelego kaj lumbildoj „Pri Praha, popolaj kostumoj kaj Sokolaro". Li parolis en Braunschweig, Artwerpen, Lille, Veghel, Uden, Hertogenbosch, Bradford, Glasgow, London, Rouen, Paris, Beaune, Chaux de Fonds, Neuchâtel, Lyon, Ville Neuve sur Lot, Bordeaux, Barcelona, Teruel, Valencia, Terassa, Sampierdarena, Genova, Voltri, Kolding, Odense, Köbenhavn, Stockholm, Gevle, Leningrad, Tallinn kaj Kiev. Sume en 32 urboj de 11 ŝtatoj. La prelegon aŭdis sume 9370 homoj. Ĝi estis faro pionira, la unua post Parrish. Ĝi signifis samtempe gravan propagandon por esperanto kaj por ĉeĥa nacio. La vojaĝo estis entreprenita kun morala kaj negranda materia subteno de la sokolaro kaj aliaj institucioj. Meritas specialan rekonon, ke d-ro Pitlík sciis jam tiam ricevi tian subtenon por esperantlingva entrepreno; tiam ja estis nia movado multe malpli ŝatata en opinio de oficialaj rondoj. La entrepreno postulis certe gravajn oferojn materiajn kaj moralajn de la vojaĝanto.

Dua grava faro estis aranĝo de la XIII-a Universala kongreso en Praha 1921. Dr. Pitlík estis ĝenerala sekretario de la Loka Kongresa Komitato kaj de la kongreso mem kaj estis en liaj manoj la tuta organizo de la kongreso kaj kuŝis sur liaj ŝultroj la plena respondeco. Oni scias, ke la kongreso sukcesis tre bone kiom laŭ ekstera tiom laŭ interna flanko. Ankaŭ la financa rezulto de la kongreso estis eksterordinare bona, la gajnita mono multon helpis al esperantistaj institucioj. Estas ne disputebla merito de d-ro Pitlík, ke li zorgis pri ekonomia buĝeto same kiom pri publikaj kaj privataj monsubtenoj, kaj ke fine rezultis profito de pli ol cent mil kronoj.

Kaj kiel trian, sed la plej gravan faron ni nomu, ke li sukcesis esti nomita en la j. 1922 lektoro de esperanto ĉe la Ĉeĥa teknika altlernejo en Praha. La starigo mem de la lektorato ne estis afero facila. Sed multe pli malfacila estis kaj estas konservi tiun ĉi postenon multe pli gravan por la movado ol por la lektoro mem. Estas bezona daŭra, persista kaj insista batalo preskaŭ ĉiutaga kontraŭ la inerteco de la homoj, kontraŭ senintereso de la junularo, kiu devas liveri la studantojn, kaj kontraŭ malbona volo de la maljunularo, kiu envias kaj malhelpas eksperimenton pri novaj aranĝoj. Ni gratulu al ni pro persistemo kaj entuziasmo de dro Pitlík, ke la lektorato daŭras, kaj ke li lektoras, kvankam li ne estas pro tio salajrata.

Tiu ĉi artikolo ne estas biografio de d-ro Pitlík. Eĉ ne taŭgas artikolo okaza por havi celon biografian. Tamen estu tie ĉi diritaj kelkaj detaloj pluaj. D-ro Pitlík estas esperantisto depost 1903 kaj depost tiu tempo li daŭre partoprenas la movadon aktive en diversaj funkcioj. Post la milito li partoprenis preskaŭ ĉiujn universalajn kongresojn, en kelkaj li estis oficiala reprezentanto de nia registaro. Ankaŭ tiu ĉi lia klopodo pri konservo de afabla sintenado de oficialaj institucioj meritas dankan mencion. Ĝi ampleksis ne sole tiun ĉi reprezentadon, sed aferojn diversajn. Ni citu tie ĉi almenaŭ, ke d-ro Pitlík estis inter la unuaj esperantistoj en la mondo, kiu sukcesis esperantlingve paroli en la radio. Jam en jaro 1923 el Praha.

Li estas prezidanto de la Ĉeĥoslovaka Esperanta Instituto de li fondita depost ĝia fondo (1923), membro de la Lingva Komitato, ekzamena komisario por esperanto ĉe la ŝtata Ekzamena komisiono por popolaj kaj burĝaj lernejoj en Praha. Depost fondo de nia Asocio estas d-ro Pitlík ĝia membro, dum pluraj jaroj ĝia komitatano kaj depost 1930 ĝia vicprezidanto.

Profesie estas d-ro Pitlík supera sekretario en komerca ministerio kaj krom tio li estas ŝatata fakulo en porfremdula propagando turisma. Pro siaj meri-

## NIA TERMOMETRO:

| pagis dum la jaro: / Por la jaro | 1930 | 1931 | 1932 | 1933 | 1934 |
|---|---|---|---|---|---|
| 1930 | 172 | 117 | 1 | — | — |
| 1931 | 56 | 216 | 112 | — | — |
| 1932 | 2 | 13 | 253 | 65 | 2 |
| 1933 (ĝis fino de junio) | 1 | 1 | 15 | 285 | 1 |
| | 231 | 347 | 381 | 350 | 3 |
| Honora membro | 1 | 1 | 1 | 1 | |
| Dumvivaj membroj | 3 | 3 | 3 | 3 | |
| Stato de la membroj | 235 | 351 | 385 | 354 | |
| El ili membroj de la Studenta Sekcio | — | 15 | 11 | 14 | |

Niaj amikoj estas ~~petataj~~ sekvi en ĉiu numero de la Bulteno niajn ciferojn, kiuj montros, kiom da esperantistoj en nia lando komprenas la necesecon per sia kotizo subteni la agadon de sia propaganda centro. Skl.

**Malgaja devo** estas la devo de la kasisto admoni la membrojn. Admonado en ĈAE estas des pli malgaja, ĉar la kasisto opinias, ke la membroj de ĈAE povas ĉie vidi la kreskantan agadon de nia asocio, la ĉiam pli kaj pli ĝojigan rezulton de la asociaj laboroj. Se ili — la membroj — supozas, ke la gvidantoj de ĈAE estas sorĉistoj, aŭ ke ili posedas la sorĉan azenon, kiu blekante elbuŝigas orajn monerojn, tiam ili treege eraras. La kapitalo, per kiu ni manipulas por progresigi nian aferon en Ĉeĥoslovakio, konsistas el unuopaj 16 kronoj. Ilin donu ĉiu el vi tuj, sen iu ajn hezitado. Ke oni tre, tre hezitas, tion montras al vi nia termometro ĉi tie publikigita. Skl.

---

toj akiritaj kiel sekretario de la „Ĉeĥoslovaka-finna komitato" li ricevis en j. 1932 de la Finnlanda ŝtatprezidento Kavaliran krucon unuaklasan de la ordeno de „Blanka rozo".

La artikolo verkata pro okazo de la 50-a reveno de la naskiĝtago de nia vicprezidanto finas necese. Ne finas la aktiveco de d-ro Pitlík. Sian kvindekan naskiĝtagon li travivos en Usono. Revenonte li aŭdu de multaj sincerajn dezirojn, ke dua duono de lia vivo egalvaloru la unuan! Ke li ĉirkaŭveturu la mondon ankoraŭ! Kamaryt.

## Protokolo

de la III-a komitata kunveno de ĈAE, okazinta la 27. VI. 1933 en Praha, kafejo Louvre. Ĉeestis: Echtner, Janda, Dr. Pitlík, Slavík, Staněk Frant., Staněk Mil., Šustr, s-ino Echtnerová. Pri sia neĉeesto informis: Hromada, Tarantíková, Votrubec. Leterojn al la kunveno sendis: Friedrich, Dr. Kamaryt, Sklenčka. Prezidis Dr. Pitlík. Daŭro de la kunveno: 20·30—23 h.

*Protokolo de la II-a komit. kunveno.* Al la protokolo de la II-a komit. kunveno sciigas Dr. Pitlík, ke la proponita somera kurso por kandidatoj de ŝtata ekzameno pro teknikaj kaŭzoj ĉi jare ne okazos; la 1. X. 33 komenciĝos kvarmonata vintra „ŝtata" kurso, al kiu aliĝoj estas jam nun akceptataj de Ĉs. esperanto instituto. En afero de „Kunlaborado de esp. organizoj de malgrandaj ŝtatoj" intervenis ĉe vicprez. Dr. Pitlík, s-o Kobler el Vieno, sendito de s-o Hovorka, okaze de sia vizito en Praha.

*Interkonsento Ĝeneva 1933.* Post detala raporto kaj klarigo de la vicprezidanto kaj debato, la komitato esprimis sian simpation kun la rezulto de la konferenco. Pri definitiva aliĝo estos decidite, kiam oni ekscios la tiurilatan vidpunkton de UEA-komitato.

*Universala Kongreso.* Kiel nia delegito al la XXV-a univ. kongreso en Kolonjo estis nomita prez. Dr. Kamaryt. Aprobitaj por li rekompenco al vojaĝelspezoj kaj kongr. kotizo.

*Vojaĝo Ajayi.* La komitato korege dankas al ĝen. sekr. Šustr por la tiurilata farita laboro. Lia detala raporto estis aprobita. (Vidu specialan artikolon!)

*Ekzamena fondaĵo.* Peto de s-o Gabryš (Lazy) pri subteno el ekzamena fondaĵo ne estis plenumita pro principaj kaŭzoj.

*Organizo.* Al Asocio aliĝis korporacie la jenaj grupoj: Lázně Bělohrad, Prešov, Holešov, Tisovec, Přerov, Lom u Mostu. Kun pluraj lokoj traktas komit. Friedrich. La komitato ĝojas pro lia agado kaj esprimas al li specialan dankon. S-o Friedrich, kies poresperanta vojaĝo al Moravio estis danke akceptita, ankaŭ zorgas pri eldono de slovaklingvaj propagandiloj.

*Kalkuloj.* Estis aprobitaj la kalkuloj pri korespondoelspezoj de prez. Dr. Kamaryt, vicprez. Dr. Pitlík, ĝen. sekr. Šustr, sekr. Slavík, komit. Friedrich kaj kalkulo por preso de la Bulteno.

*Stockholma artista grupo.* Sveda esp. instituto pe

tas informojn, rilatantajn al la projektata eŭropa rondvojaĝo de stockholma artista grupo, kiu dum aŭgusto intencas forlasi Stockholmon por en esperanta lingvo prezenti teatraĵojn en pli grandaj urboj eŭropaj. Praha-n oni intencus viziti la 8., 9. IX. La afero transdonita al la Esperantista klubo en Praha.

*Ŝlosiloj esp.-ĉeĥaj.* Ĉs. esp. instituto sciigas, ke ĝi konsentis por la esp. ĉeĥaj ŝlosiloj, aĉetitaj de ĈAE en la j. 1926—27, pluan 25% rabaton.

*Asocia oficejo.* La komitato sekvas eblecon akiri ejon por Asocia oficejo, ĉar definitiva aranĝo (ankaŭ rilate al pagita oficisto) estas tre dezirinda pro progreso de la movado ĉe ni.

*Jubileo de la vicprezidanto.* Dr. A. Pitlík 24. de julio festos sian 50-an naskiĝtagon. Ĉar li la 8. VII. forveturas Amerikon, ĝen. sekretario uzas la okazon en nomo de la Asocio danki lin por lia ĝisnuna laboro kaj esprimi deziron, ke li en plena saneco povu ĝoji kun ni pri ĉiu estonta sukceso en esperanto movado.

---

## Prelegvojaĝo de Kola Ajayi.

Unu el la plej rimarkindaj entreprenoj, kiujn nia Asocio iam entreprenis, estis la prelegciklo de nigra esperantisto Kola Ajayi. Ĝi okazis dum pasinta majo, kaj daŭris precize unu monaton.

Negro el okcidenta Afriko el Nigerio, el urbo Lagos, ano de gento joruba, homo klera, parolanta kelkajn eŭropajn lingvojn, bonege majstranta lingvon esperanto, prelegas pri Afriko, pri ĝiaj negraj popoloj, pri iliaj moroj, kutimoj, kaj kantas tipajn kantojn de sia joruba gento. Fakto, ke li siajn paroladojn faras esperante, donas malofťan okazon por unika propagando de nia lingvo. Estis nia deziro doni al niaj kluboj tiun ĉi malofťegan okazon, kaj tial ni entreprenis rapide ĉiujn laborojn por efektivigo de la prelegvojaĝo, tute ne atentante, ke monato majo jam ne taŭgas por aranĝo de simila entrepreno. Malgraŭ tio sukceso de la paroladoj estis pli granda ol ni atendis.

S-ro Kola Ajayi (Aĵaji) venis en nian landon jam la 1. V. kaj tuj sekvontan tagon okazis unuaj liaj paroladoj. Jen la tuta programo:

(La lastaj ciferoj montras nombron de ĉeestantoj.)

| | | |
|---|---|---|
| 2. V. | *Košice*, parolado por studentoj | 700 |
| | parolado publika | 440 |
| | kantado en radio; | |
| 4. V. | *Tisovec*, granda publika parolado | 1000 |
| 5. V. | *Rimavská Sobota*, publika por Slovakoj | 250 |
| | publika por Hungaroj | 250 |
| 7. V. | *Trnava*, publika parolado | 200 |
| 8. V. | *Bratislava*, parolado en Esp. Klubo | 60 |
| 9. V. | *Brno*, publika parolado | 250 |
| 10. V. | lerneja parolado | 110 |
| 11. V. | *Uherský Ostroh*, publika parolado | 400 |
| 12. V. | *Uherské Hradiště*, publika parolado | 500 |
| 13. V. | *Moravská Ostrava*, lerneja (tagmeze) | 300 |
| | *Kopřivnice*, publika (vespere) | 300 |
| 14. V. | *Radvanice apud M. Ostrava*, publika | 320 |
| 15. V. | *Slezská Ostrava*, publika | 330 |
| 17. V. | *Bakov nad Jizerou*, publika | 540 |
| 18. V. | *Mladá Boleslav*, publika parolado | 160 |
| 19. V. | lerneja parolado | 260 |
| 20. V. | *Praha*, publika parolado | 200 |
| 21. V. | kantado en radio; | |
| 22. V. | *Hradec Králové*, unua publika parolado | 244 |
| 23. V. | dua publika parolado | 276 |
| 24. V. | parolo por esperanto dum skolta festo ĉe fajro | 1000 |
| 25. V. | kantado en la lernejo | 96 |
| 26. V. | *Plzeň*, publika parolado | 360 |
| 28. V. | *České Budějovice*, publika | 200 |
| 29. V. | *Pardubice*, lerneja parolado | 900 |
| | publika parolado | 200 |
| 30. V. | *Postoloprty*, publika parolado | 200 |
| 31. V. | unua lerneja | 300 |
| | dua lerneja | 240 |

Entute okazis 28 paroladoj, du radio-kantadoj, unu kantado en lernejo kaj parolo dum skolta festo, ĉio en dudek diversaj lokoj.

Jen kelkaj kritikoj: Klubo en Košice skribas: „..sukceso de ambaŭ paroladoj estis plena, morala eĉ financa. Kola Aĵayi ĝenerale plaĉis, lia konduto estas modesta; li estas abstinenculo kaj bone edukita homo. Lia apero ĉie faris sensacion, kiu estis des pli granda, ke la publiko komence ne komprenis, kiel estas eble, ke li havas ĉi tie tiom da konatuloj. Li paroladas klare, liaj bildoj estas interesaj; precipe plaĉas liaj kantoj. Ni ricevis flatajn gratulojn de estraro de radio kaj de hazarde tie ĉeestantaj hungaraj aktoroj. Je publiko tre bone efikis, ke oni povis meti al li diversajn demandojn. Surprizo estis, ke multaj el la demandoj estis farataj direkte en esperanta lingvo. Kontenteco de la publiko estis absoluta kaj ni aŭdis multajn, kiuj bedaŭris, ke ili ne ĉeestis." Samtempe oni informas nin pri bela financa rezulto, kiu grave pliriĉigis kluban kason.

Direktorejo de ŝtata ĉeĥoslovaka reforma reala gimnazio en Brno-Královo Pole skribas: „..Parolado havis grandan sukceson. Laŭ mia deziro s-o Aĵayi parolis tre klare kaj malrapide, ke du lernantoj el VII-a klaso, kiuj antaŭan tagon la tekston kun mi tradukis, kapablis la paroladon interpreti. Lia esperanto estas ĝusta. Bildoj estas tre belaj kaj diversaj... Intereso pligrandiĝis pro liaj kantoj, akompanataj je tamburo. Mi povas do tiun ĉi paroladon varmege rekomendi. Tia malofta okazintaĵo venos eĉ ne dum dekjaro. Samtempe estas la parolado el punkto geografia instrua kaj tre reala; s-o Ajayi ne rakontas iajn fabelojn. Al liaj spritaĵoj la lernantoj kelkfoje ridis..."

Uherský Ostroh: „..kaj rezulto? — La prelegon vizitis 400 personoj. En nia urbo Uherský Ostroh ne atendita amaso, ĉar ĉi tie vivas nur 970 enloĝantoj. Kompreneble, ke venis eĉ el ĉirkaŭaj vilaĝoj, spite tion, ke pluvis. Lumbildoj kaj prelego ĝenerale tre plaĉis..“

Uherské Hradiště: „..venis pli ol 500 personoj kaj jam eniro de s-o Ajayi en ĉambregon vekis longedaŭran aplaŭdon. Ĉeestis multaj profesoroj, direktoroj ktp. Unu el ili poste diris: Prelego de negro estis por vi (esperantistoj) multe pli bona, ol 15 prelegoj aliaj. Tio estas fakto..“

Klubo en Hradec Králové skribas: „..Ni estcs al ĈAE treege dankemaj, se ĉiujare ĝi sendos al ni iun ajn eksterlandan samideanon, ĉar ni konvinkiĝis, ke ĝuste tiuspeca propagando estas nuntempe la plej efika kaj ni ne povas kompreni, ke iu ajn klubo povis heziti uzi ĉi tiun bonegan okazon, da kiuj vere estas malmulte.“

Ankaŭ el ceteraj lokoj venis ĝenerale tre favoraj raportoj kaj kritikoj. Kelkloke oni malfavore kritikas parton de la lumbildoj, dirante, ke ili ne estis sufiĉe klaraj. Sed fine ĉiuj lokoj esprimas grandan kontentecon kun enhavo de la parolado, lumbildoj kaj kantoj. Ni mem konvinkiĝis, ke la lumbildoj ne estas malbonaj. La parolado mem kaj jorubaj kantoj estas unuarangaj!

Morala sukceso de la prelegoj estis ĉie granda. Kelkloke oni eĉ akiris rimarkindan profiton financan, aliloke oni kovris ĉiujn elspezojn, kaj ĝojas pro la morala profito, kiu estas vere ne taksebla. Ie oni ne atingis ekvilibron en la buĝeto kaj apud granda morala profito oni konstatas malprofiton de kelkaj dekkronoj, kiun malprofiton oni ĝoje pagas, ĉar la loka propagando por esperanto, kiu per la parolado estis farita, valoras certe pli multe. Sed — bedaŭrinde — ne ĉie oni tiel komprenis la devojn kaj destinon de la lokaj grupoj!!

Fine ni devas sincere danki al ĉiuj, kiuj ofte kun mirinda fervoreco kuraĝiĝis al entrepreno riska. Estis lokoj, kompare malgrandaj, kaj tamen la diligentaj esperantistoj ne kontentiĝis kun unu parolado, sed ili aranĝis tuj du eĉ tri! Ni volonte citus ĉi tie ĉies nomojn, sed ni certe multajn forgesus, ĉar ni scias nur pri tiuj, kun kiuj ni korespondis. Do sinceran dankon al ĉiuj, kiuj tiel meritis pri sukceso de la prelegvojaĝo.

Okazis, ke kelkajn lokojn ni ne povis kontentigi kaj s-on Ajayi tien direkti. Tiujn lokojn ni petas pri afabla pardono. Ni traktas kun s-o Ajayi kaj ni espereble kontentigos ilin aŭtune aŭ vintre dum reveno de s-ano Ajayi el Balkano al eŭropa nordo. Se intertempe venos pliaj aliĝoj, ni estas pretaj kontentigi ankaŭ tiujn. Estas rekomendinde, ke tiuj kluboj, kiuj hezitis, aŭ tiuj, kiuj ne opiniis la paroladon de negro sufiĉe serioza kaj unuaranga, ke ili nun ne preterlasu verŝajne la lastan okazon de tiel unika propagando. Pri intenco inviti s-on Ajayi oni informu nin laŭeble baldaŭ. Per nia Bulteno aŭ speciala cirkulero ni informos vin post ia tempo pri detalaĵoj.

Krom multegaj cirkuleroj, kiujn ni el nia oficejo dissendis al ĉiuj kluboj, ni devis skribi pli ol 100 leterojn kaj poŝtkartojn, krom 12 telegramoj. En tiuj ciferoj iomete respeguliĝas laboro, kiun ni ĝoje plenumis, por efektivigo de granda entrepreno.

Šustr.

---

## Nia UEA jubileas!

Dudek kvin jaroj de UEA — signifas dudek kvin jarojn da bona laborado, da seninterrompa, griza administrado, da multaj zorgoj miksitaj kun malpli multaj ĝojoj, da honesta luktado pri sekura ekzisto de la plej praktika organo de la neŭtrala movado.

Jubileante, ni pensu ĉefe pri la laboro farita kaj konstante farata. Ĝin plene kompreni povas nur tiu, kiu mem kunlaboris aktive. Jubileante, ni ekmemoru ne nur la fondintojn kaj la gvidantojn, sed same dankeme ankaŭ la milojn da nekonataj kunlaborantoj en la tuta mondo — nia UEA ja vere estas asocio tutmonda de sia komenco. Jubileante, ni sciu ĝuste kaj juste taksi la moralan valoron de la servoj de UEA-delegitoj plenumitaj. Komuna lingvo estas bona afero, sed sian tujan uzeblecon ĝi akiris absolute nur per la praktikaj aranĝoj de la UEA-servado. Ne ĉiu novbakita esperantisto kapablas tuj bone farti en la UEA-atmosfero. La supernaciismo ĉiam ankoraŭ ŝajnas danĝera al multaj. Iom da memstara cerbumado montras vojon al plenkompreno.

Historian skizon pri UEA legis ĉiu membro antaŭ malmultaj tagoj en la ĵus aperinta jarlibro 1933. Legu ĝin ankoraŭfoje kun malfermita koro kaj ĝoju, ke ankaŭ sur la esperantista kampo ekfloris floro malofta: la persisteco en laboro!

Ni, ĉeĥoslovakaj esperantistoj, rajtas solene la jubileon de UEA sen riproĉoj en niaj koroj. Ni praktike pruvas per niaj 1200 UEA-anoj kaj delegitoj en 350 malsamaj lokoj de nia lando, ke ni ne nur scias laŭdi kaj aplaŭdi, sed ke ni ankaŭ fidele partoprenas en la laborado kaj kotizado. Se la ceteraj landoj, ni diru nur la eŭropaj, same estus agintaj, tiam nia UEA jam delonge estus asocio tiom impona, kiel postulas ĝia rolo en nia movado. La rezolucio de nia Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista pri la reorganiza problemo klare diras, ke ĈAE kaj UEA en nia lando kunlaboris kontentige por bono de la tuto.

Ne estas mirige, ke en nia lando estas skribataj leteroj de jena tipo: „Pro financa krizo mi nur nun sendas mian kotizon kiel Membro-Subtenanto de UEA, al kiu mi volas resti fidela ĝis mia morto. Mi sendas ankaŭ mian kotizon por nia landa asocio (ĈAE). Via Dro P. D.“

Sklenčka.

---

# Kroniko esperantista en ĈSR.

**Germana Esperanto-Ligo en ĈSR.** havis ĝeneralan kunvenon 26. III. 1933 en Ústí n. L. dum ĉeesto de 32 personoj el 14 lokoj. La ligo havis en pasinta jaro 395 pagintajn membrojn, kiuj apartenis al 26 grupoj kaj vivas en 80 lokoj. Pri la reorganizo la kunveno akceptis rezolucion postulantan renovigon de la Helsinki-kontrakto aŭ starigon de reorganizo interkonsente kun UEA. La kunveno decidis pagi al KR la kutiman kotizon kaj admoni siajn membrojn resti fidelaj al UEA. La kotizo por 1933 estis fiksita Kĉ 26·50. La kontrakto kun Marto ne estas plu renovigota. La membroj-senlaboruloj pagos sole 7·50 Kĉ kaj ne rajtos ricevi la Marton. En la raporto pri agado estis akcentita propaganda semajno, kies efiko tiun jaron estas taksata malpli efika ol jarojn antaŭajn kaj propagando en la foiro de Liberec, kie dum 1932 estis granda Esperanto-kolono kun flirtanta flago. Apartan laŭdan mencion meritas informo, ke la Foiro de Liberec en kunsido de Unio de internaciaj foiroj, okazinta aŭtunon 1932 en Milano, subtenis enkondukon de esp-o por la Unia uzo. Tio okazis laŭ instigo de GEL-prezidanto inĝ. Scholze.

**Soĉne.** La 25-an de majo kaj la 15-an de junio 1933 aranĝis Ĉeĥoslovaka Societo de Nevidantaj Esperantistoj en Praha ekskursojn tuttagajn al Krč apud Praha. Dank' al direkcioj de Klar kaj Deyl-institutoj, kiuj konfidis al ni siajn edukatojn, havis nia aranĝo bonegan sukceson. La unuan ekskurson partoprenis pli ol 70 personoj kaj la duan pli ol 80 personoj; kvankam pluvis eĉ hajlis, sincera gajeco tute ne forlasis nin. La ekskurson krom la gvidantoj ĉeestis preskaŭ la tuta nuna komitato de „Soĉne" kaj familianoj de neforgesebla, mortinta „patro" de nevidantoj, s-ro prof. Stejskal. La edukatoj de la institutoj prezentis al ĉeestantoj ĉion, kion ili eklernis de niaj senlacaj instruistinoj de Esperanto en nomataj institutoj: f-inoj Nývltová kaj Kratochvílová en Klar kaj Jarošová en Deyl-instituto. Dum la lasta ekskurso ankaŭ ne mankis gastoj: s-ro Weiss H. el Mukačevo kaj f-ino A. Rechnicová el Poprad. — Post la ĝenerala kunveno de Soĉne oni ŝanĝis la adreson de nia konfidato: R. Bloch, Praha-Smíchov 106. Adreso de redakcio „Auroro" restas: Praha-Nusle II., 741. — Dum la lasta komitata kunveno oni decidis, ke la Köln-kongreson partoprenu s-ro Nálevka kaj f-ino Mikschová, ambaŭ blinduloj.

**Kunvenoj de nordbohemaj esperantistoj** daŭras. La kvina okazis en Břešťany la 14. V. 1933 en gastejo „U města Prahy" posttagmeze. En programo estis paroladoj de s-o Schmelzer (la paco sub signo de esperanto), f-ino Holas (iu maniero de propagando), prof. Murath (organiza demando). Por informadi de nordbohemaj esperantistoj estas eldonataj ciklostilitaj cirkuleroj titolitaj „Interrondilo" sub redakto de prof. Murath kaj instruisto Krisl. La 1-a numero aperis en aprilo, la dua en majo.

**Konferenco de orientbohemaj esperantistoj en Bernartice (Bernsdorf).** La 11-an de junio kunvenis en tiu apudlima vilaĝo submontara 16 samideanoj el 11 malsamaj lokoj. Diskutitaj estis ĉiuj aktualaĵoj de nialanda movado, precipe la aranĝo de ekskurso al Jičín (8.—9. julio), de la internacia libertempejo en Lázně Bělohrad (julio —septembro), stacidomaj tabuloj (aranĝo de ĈAE), reorganizo de la movado. Malnovaj geamikoj kunvenis por pasigi kelkajn agrablajn horojn. La kunveno vekis en la loko grandan intereson, kiu ne malaperos baldaŭ. La aranĝantino s-ino Anjo Herzog meritas specialan dankon por la modela preparo de ĉi tiu kunveno.

**Bratislava—Wien,** interurba vizito. La esperantistoj kaj skoltoj el Bratislava (20 p.) vizitis 3.—5. VI. gviditaj de samideano A. Macek, aŭstriajn esperantistojn kaj ĉeestis la aranĝojn de la konferenco de aŭstriaj esperantistoj en Wien. Ili estis tre afable akceptitaj kaj la amikaj ligoj inter samideanoj el la ambaŭ urboj estis ankoraŭ pli fortigitaj.

**Interlanda vizito.** La esperantistoj el Bratislava kaj Trnava gviditaj de s-ro Bárta (20 p.) vizitis per la ŝipo la 25-an de junio la aŭstriajn urbojn Hainburg kaj Deutsch-Altenburg kunveninte tie kun samideanoj lokaj kaj Vienaj, gviditaj de s-oj Steiner kaj Frey. La nombro de Vienanoj egalis nombron de Bratislavanoj. Komunaj konversacioj estis tiom utilaj, kiom amuzaj kaj ĝenerale estis esprimita deziro daŭrigi tiajn kunvenojn de diverslingvanoj el najbaraj ŝtatoj.

**Radio.** Esperantista klubo kaj Radio-Journal en Bratislava aranĝis la 26. VI. je la 20·10—21·10 h., per ondo 279·3 la IV-an radiovesperon, dediĉitan al skoltoj, kies programo konsistis el 3 partoj: I. parto — esper. parola: Skolta tendaro sur Danubo, almarŝo, salutado, paroloj, recitoj. II. parto: ĉeĥaj artaj kantoj por la junularo prezentitaj per kantistino ĉe fortepiano. III. parto muzika: skolta ĥoro, esperantista mandolinista kvaro, gramofondiskoj. Konferenciero de la programo estis prof. V. Jukl.

**Laborista Ligo Esperantista en Ĉeĥoslovakujo** eldonis ĉeĥan tradukon de la konata broŝuro de Lanti sub titolo „Dělnický esperantismus". La broŝuro kostas Kĉ 2·50 (per la poŝto Kĉ 3·—) ĉe la Ligo, Praha VII., Domovina. La ciklostilita Bulteno de la Ligo aperas jam la sesan jaron. La ĝen. kunveno okazinta la 9. IV. decidis translokigi sidejon de la Ligo al Plzeň.

**Paroladvojaĝo de s-o Pech.** Konata propagandisto inter la laboristaro s-o J. Pech el Plzeň parolados la 5. VIII. en Stockholmo, la 9. VIII. en Oslo, je temo „Fluge tra Ĉeĥoslovaka respubliko", akompanante la prelegon per kolorigitaj lumbildoj. Li vizitos ankaŭ Göteborg, Kopenhagon k. a.

**Radio.** Prof. Kilian el Třebíč proponas en la 7-a n-ro de „Ligilo" samtempan ĉiumonatan perkaj pri-esperantan disaŭdigon de eŭropaj radiosta-

cioj. La propono estas transdonota al la XXV-a en Kolonjo; ĉeĥoslovakaj kaj eksterlandaj samideanoj, havantaj influon je radiostacioj, estas petataj kunhelpi. Proponojn, instigojn kaj demandojn adresu al: Radiojournal en Brno, ĈSR. La 16. VI. radioprelegis s-o V. Slaný en radiostacio Mor. Ostrava pri „Ĉeĥoslovaka eksporto".

---

# Lokaj informoj.

**Praha.** *Esperantista Klubo en Praha, Národní 20 a. 9. VI.* vizitis nian klubon s-ro Aladar Breuer el Bratislava kaj rakontis pri sia vojaĝo kaj esp. travivaĵoj en Eŭropo. (Li detale parolis pri Slovakoj kaj ilia malkonsento kun revisionismo.) — *16. VI.* parolis s-ro . . . . el Berlin pri lastaj teruraj persekutoj en Germanujo (li estas ankaŭ unu el la forkurintoj.) — *23. VI.* prelegis s-ro Mustafa Raden el Ĵavo (Ned. Hindujo) kun jena programo: Kial mi iris en la vastan mondon, interesaj travivaĵoj kaj kritikaj momentoj el mia 4 jara mondvojaĝo tra Azio, Afriko kaj tra 14 ŝtatoj de Eŭropo. El sia hejmo li foriris en j. 1929 tute sen mono. Li estas ankaŭ amatoro en diversaj magiaj eksperimentoj, sed por tio bedaŭrinde jam ne restis tempo. Nun li fariĝis jam ĵurnalisto kaj korespondanto de kelkaj grandaj ĵurnaloj en Afriko. Li fariĝis esperantisto antaŭ 2 jaroj kaj lia unua esp. parolado okazis tiam ankaŭ en „Esp. Klubo en Praha". S-ro Mustafa Raden estas nun 22 jara. — *Eksterprahanoj!* Kiam vi havas okazon, vizitu nian klubon. Vi ĉiam trovas krom granda esp. biblioteko kun 1500 volumoj ion interesan. Ni kunvenas ĉiam vendrede post la 8a horo (vidu jarlibron de UEA). Subtenu nin morale per via vizito.

Staněk Mil.

*Efika montra ŝranko* propagandanta nian aferon pendas en la viva avenuo Na Poříčí en Praha II. apud la palaco n-ro 26. La grandan ŝrankon, ĉirkaŭatan nun ĉiutempe de publiko, disponigis senpage la posedanto de la firmao Jakub Kauders. La aranĝon de la ŝranko prizorgas EK Praha.

**Bakov.** La 29. V. estis malfermita kurso por komencantoj.

**Bor.** La urbaj kinejoj en Bor kaj Arnsdorf projekcias senpage antaŭ ĉiu prezentado Esperanto-diapozitivon. En presejo de Gustav Albert estas kompostisto-esperantisto.

**Česká Kamenice.** Ĝenerala kunveno de la loka GEL-grupo okazis 29. III. 1933. La grupo havas 22 anojn, el kiuj la kluban vivon partoprenas aktive proksimume ok. En multaj lokoj de la urbo pendas afiŝoj pri la Kolonja kongreso.

**Česká Lípa.** Ĉefkunveno de la Nordbohema Esperanto-distrikto (de GEL) okazis 2. IV. dum ĉeesto de 20 p. el 10 lokoj. Estro de la distrikto estis elektita s-o Taubmann, sekretarioj Schossig kaj Heller. La kunvenon sekvis „amuza posttagmezo", kiun ĉeestis 60 samideanoj. Krom la parolantoj kaj deklamantoj samideanoj Ullrich, Witka, Baumgartl plenigis la programon muziko de la „Esperanto-jazz-orkestro", gvidita de s-o Sitte el Schwoika.

**Holešov.** La loka klubo anoncis sian korporacian aliĝon kun siaj 8 membroj. Dankon kaj gratulon al nia fidela ano prof. Fr. Růžička.

**Jičín.** Kurso por komencantoj dum januaro-junio 1933, gvidita de s-ro inĝ. Mareš, profesoro de komerca lernejo, havis 20 partoprenantojn.

**Kolín.** La 27an de januaro havis la klubo sian IX. ĝeneralan kunvenon, kiun partoprenis 16 membroj kaj 2 gastoj. Oni traktis pri aferoj koncerne la kursojn kaj pri kluba agado en nova jaro. Estis decidite, ĉiujn membrojn, kiuj pagis la kluban kotizaĵon por kuranta jaro, aligi al ĈAE. Nova komitato: Jos. Drahovzal, prezidanto, Jan Janda, vicprezidanto, J. Václavek, sekretario, Václav Karel, kasisto, Jaroslav Staněk, bibliotekisto. La klubaj kunvenoj okazas kiel kutime ĉiun duan kaj kvaran vendredon de ĉiu monato en hotelo Lidový dům je la 8a horo. Gastoj estas kore bonvenantaj.

**Krnov.** Ĝenerala kunveno de la loka GEL-grupo okazis 15. III. 1933. La grupo havas 36 membrojn. En la lokaj gazetoj aperis dum 1932 78 artikoloj tuŝantaj esperanton. Estis elektitaj prezidantino s-ino B. Rotter-Wachsmann, sekretario Wilhelm Tandler.

**Lázně Bělohrad.** Loka rondeto de esperantistoj en sia kunveno la 31. V. decidis nomigi sian grupon klubo. La klubo korporacie aliĝis al nia Asocio kun siaj 12 membroj kaj esprimas intencon ne resti ĉe tiu ĉi nombro. Tiu ĉi decido estu ekzempla! La klubo de Lázně Bělohrad estas la o k a loka grupo, aliĝanta korporacie al ni.

**Moravská Ostrava.** Dum eksterordinara ĝen. kunveno, okazinta la 23. V. decidis la kluboj en Mor. Ostrava kaj Vítkovice unuiĝi. Samtempe estis elektita la jena komitato: Prez. K. Chrobák, vicprez. O. Gadula, sekr. V. Slaný, kas. J. Harna. Esperantistaj kluboj en M. Ostrava, Sl. Ostrava kaj Radvanice pro celkonscia kaj laŭplana poresperanta agado en regiono de M. Ostrava starigis komunan centran komitaton, konsistantan el po 2 membroj de la nomitaj kluboj.

**Nymburk.** La jarkunveno de la Klubo okazis 5. III. 1933. Estis elektitaj prezidanto s-ro Emil Tyl (ulice 28. října, 1094), sekretario Jindřich Doubrava. Korespondo estu adresata al la prezidanto.

**Plzeň.** La loka grupo de GEL aranĝis kurson por germanlingvanoj en septembro—decembro 1932. Partoprenis 6 studentoj kaj 1 sinjorino. Ĝenerala kunveno de la grupo okazis 17. II. 1933 dum ĉeesto de 11 personoj. La sekretariino M. Beck plendas pro malgranda intereso de la membraro.

**Prostějov.** Esperantista klubo en Prostějov decidis dum sia ĝen. kunveno la 19. VI. aligi korpo-

racie al ĈAE ĉiujn siajn membrojn. La nova komitato: Prez. F. Heikenwälder, vicprez. A. Malíček, protokol. S. Jeřábek, kas. A. Oslzlý.

**Röhrsdorf u Cvikova.** Distrikta kunveno de ĈLAE okazis la 11. VI. En programo la 9-a konferenco, amuzado.

**Svitavy.** Kurson kun 15 partoprenantoj 23. IV. gvidas s-o Karger.

**Šumperk.** Kurson por 20 anoj de loka grupo de socialista junularo gvidas s-o Scholz.

**Tisovec.** Raporto pri la laboroj 1932-1933 de esp. klubo „Comenius". Ĉar la plej multaj membroj de la klubo estas en ŝtata servo, la kluba jaro komencas la 1-an de septembro kaj finas la 30an de junio. La kunvenoj estis ĉiusemajne merkrede. Dum la kunvenoj la membroj tralegis siajn prelegojn, diversspecajn kaj propre ellaboritajn. Dum septembro kaj oktobro estis absolvitaj ĉiun duan dimanĉon ekskursoj, kelkfoje kun turisma klubo. La plej granda okazis en la groton D o m i c a, kiu estis samtempe bona propagandvojaĝo. La 1. XI. 1932 komencis vivi junulara frakcio, kiu entenas 25 gejunulojn, burĝlernejajn studantojn. En decembro komenciĝis kurso de esperanto en Rimavská Sobota, kiu havis grandan moralan profiton. Post la fino de l' kurso por komencantoj komencis supera kurso, kiu daŭras ankoraŭ. Komence de aprilo 1933 komencis denove dimanĉaj vagadoj. La 4. kaj la 5. V. havis Kola Ajayi tri paroladojn, unu en Tisovec, unu slovakan en Rimavská Sobota kaj unu hungaran en sama loko. Loka turisma frakcio uzas ankaŭ esperantajn surskribojn. Informtabuloj de l' klubo servas jam du jarojn en ambaŭ stacioj de l' urbo. Klubo kunlaboras en tutmonda artpentrista ekspozicio en Sosnowiec (Polujo). La parizan kongreson vizitis unu membro, XIVan ĝen. kunvenon du; ĉiu membro de l' klubo estas membro de ĈAE kaj naŭ estas membroj de UEA. (Tiu ĉi aliĝo signifas jam la naŭan klubon. Red.) Dum la monatoj julio kaj aŭgusto estas kluba libertempo; en la nomo de la klubo servas nur loka delegito de UEA en Tisovec.

Fr. Vk.

**Trnava.** K u r s o gvidita de prof. M. Lukáš por gimnaziaj studentoj dum la lernejjaro 1932-3 estis finita 22. VI. 1933 per studenta festo, en kiu la kursanoj dankis kaj honorigis sian instruinton. — E k s p o z i c i o de esperantaĵoj estis aranĝita de prof. Lukáš 3.—5an de junio 1933.

---

# Informoj.

**Amerika vojaĝo de ĈAE-vicprezidanto.** D-ro Pitlík forvojaĝis la 8. VII. el Praha tra Arnhem, Rotterdam kaj New-York por atingi Usonon, kie li intencas studi la turismajn aferojn kaj interalie viziti ankaŭ la mondekspozicion en Chicago. Post sia reveno (20. VIII.) li aranĝos en Ĉeĥoslovakujo paroladojn, akompanatajn per lumbildoj kaj usona indiĝena muziko. La 29. VII. parolos d-ro Pitlík al esp-istoj de Chicago pri Ĉeĥoslovakujo.

**La XXV-a Universala kongreso de Esperanto** okazos de la 29. VII.—5. VIII. 1933 en Köln a. R. Ĝis mezo de junio aliĝis 625 gesamideanoj el 27 landoj (17 el ĈSR). Kotizoj: 20 gmk, junuloj 5 gmk, blinduloj kaj ties gvidantoj ricevos kongreskarton senpage. Helpkonkresanoj (neĉeestantoj) pagas 10 gmk. Adreso: Köln a. R., Trajanstr. 25. La vizitontoj al Franfurt am Main turnu vin al s-o C. Barthel, Wochlerstr. 14—II. Prezidanto de ICK alvokas en n-ro 25 de Heroldo ĉiujn ĉeesti la kongreson en intereso de la sukcesigo al la esperantista movado en Germanujo kaj la tuta Esperantujo.

**Nova mondskribo.** D-ro Alex. Sommer-Batěk (en Praha-Liboc 162), malnova esperantisto, eltrovis novan mondskribon, nomitan „neoglifoj". Li uzis 360 jam ĝenerale uzatajn bildaj signojn, kiuj estas kunigitaj per kelke da simplaj reguloj, kiuj ebligas esprimi ĉiujn eblajn ideojn. Tiurilataj propagandiloj estis eldonitaj en kelkaj mondlingvoj kaj ankaŭ en esperanto.

**Jarlibro de UEA** ĵus aperis. Ĝi enhavas adresojn: de UEA-delegitoj en 2015 lokoj de 74 landoj, de 1099 lokaj esperantistaj societoj en 993 lokoj, de 39 naciaj societoj en 35 landoj kun 25.000 membroj, de 14 laboristaj organizaĵoj kun 13.209 anoj, de 44 fakaj esp. societoj, de 13 naciaj kaj unu internacia Esperanto-Institutoj, nomaron de esperantlingvaj gazetoj, el kiuj estas 51 propagandaj, 30 internaciaj kaj 12 laboristaj. Je fino troviĝas interrilata adresaro por korespondemuloj. La jarlibro, kiu aperas jam la 21an fojon, per siaj 448 paĝoj kaj valora enhavo, estas la plej bona propagandilo de esperanto kaj unika konvinkiganta dokumento pri ĝia taŭgeco kaj sukcesa aplikado.

**Informilo** de Ligo de katolikaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakujo n-roj 1-2 aperis je fino de junio 1933. Ĝi enhavas la jenajn artikolojn: „Ĝoju kun ni!", „Dek jaroj" kaj „Dekjara laboro de katolikaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakujo". La Informilo, presata de A. Pražák en Jablonné n. O., aperas kvarfoje en la jaro.

**Ĉeĥoslovakan Antologion** preparas AELA, la plej granda esp. eldonejo. Pri eldono decidos la AELA-membroj, kies balotado estas aranĝata dum julio nunjara. Aliĝu kaj helpu per via voĉo efektivigon de la granda plano: eldono de nia Antologio, esperanta bildo de nia kultura vivo. Jara kotizo 140 Kč (ankaŭ en partopagoj) por 6 libroj kun proksimume 2000 paĝoj.

Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz čsl. esperantistů v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík.
Tiskne A. Pražák, Jablonné n. O. — Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102 047-VII-1933.